# ☆ la informilo

***

## informbulteno pri esperanto


bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

**ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO**

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*
*Maison des Jeunes et de la Culture*

*27, rue de la République, 54000 NANCY F*
*PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY*


**nouvelle série**
**trimestriel**
**2e trim. 1981**
**n° 34**

**abonnement**
**un an: 14 F**
**UNU JARO: 14 F**
( 8 INTERN. KUPON. )


**ANTO....FLASH ★ ESPERANTO.... FLASH ★ ESPERANTO**

★


## La Pologne invite...




Pays natal du planificateur de l'espéranto, la Pologne est un des pays d'Europeoù la langue internationale suscite le plus de réalisations concrètes. C'est ainsi que la ville de BYDGOSZCZ, placée récemment sous les projecteurs de l'actualité, organise du 31 mai au 7 juin deux grandes manifestations parallèles, la conférence de MONDA TURISMO et la 6ème RENCONTRE INTERNATIONALE ESPERANTISTE. Un programme à vocation culturelle particulièrement riche a été élaboré à cette occasion..De nombreux circuits touristiques à travers tous le Pays sont par ailleurs offerts aux estivants, et ce exclusivement par l'entremise de l'espéranto!

★

### PRES DE 1000 CONGRESSISTES DE 45 PAYS AU CONGRES MONDIAL DE BRASILIA! ( juillet 1981 )





*Cette statistique publiée fin février indique que les Français sont les plus nombreux futurs participants. L'ASSOCIATION UNIVERSELLE d'ESPERANTO organise des vols à partir de 11 villes d'Europe en plus des "charters" frétés par de nombreuses associations nationales. Ce Congrès se déroulera en fait... en hiver... mais avec une température garantie de 14 à 25°. En dehors des excursions uniques qui feront certainement date dans la vie de plusieurs congressistes, un buffet pantagruélique tiendra lieu de banquet traditionnel, où l'on pourra consommer pour un prix modique plus d'une centaine de viandes, légumes et fruits exotiques!*

## LES SENATEURS ET L'ESPERANTO

Monsieur Alain Poher, Président du Sénat, a accepté la présidence d'honneur du 73ème CONGRES NATIONAL d'ESPERANTO qui se déroulera à PERPIGNAN du 5 au 9 juin. Rappelons que la seconde assemblée parlementaire française est également saisie d'un projet de loi sur l'enseignement optionnel de l'espéranto. La pétition en cours pour soutenir le premier projet soumis à la Chambre des Députés a déjà recueilli plusieurs plusieurs milliers de signatures.


## REGENSBURG (RFA) ACCUEILLE LE 33ème CONGRES DES CHEMINOTS ESPERANTISTES





*Avec son centre ville typiquement moyenâgeux, sa célèbre cathédrale gothique qui domine le Danube, son pont de pierre datant de 1135... Regensburg sera le point de rencontre d'un Congrès habituellement très prisé des gens du rail qui pratiquent la langue internationale. Relevons dans un programme particulièrement attractif, un concert de prestige, une soirée de magie et de folklore, trois excursions en bus et en bateau (une fois n'est pas coutume!), une expérience de contacts multinationaux tentée par les radio-amateurs espérantophones.*

## ...214 MANIFESTATIONS ESPERANTISTES EN 1981 !

Telle est la liste -non complète!- élaborée par MONDA TURISMO qui publie le calendrier de diverses rencontres organisées grâce à l'espéranto au cours de 1981. Ce document qui mentionne à la fois le CONGRES MONDIAL DE BRASILIA, les stages de GRESILLON (France) ou la SEMAINE INTERNATIONALE DE LAPONIE est une des preuves les plus tangibles de la vitalité actuelle de la langue internationale.




## UNE GRAMMAIRE ANALYTIQUE COMPLETE DE L'ESPERANTO



*... vient d'être rééditée. On a accoutumé de mettre l'accent sur la simplicité de la grammaire de l'espéranto qui peut effectivement se réduire à 16 règles fondamentales simples. La densité de l'ouvrage cité -600 pages- est due en fait à une analyse poussée et exhaustive des différentes motivations d'ordre linguistique qui ont guidé Zamenhof tout au long de son travail de planification de la langue et la justification par des milliers d'exemples de l'utilisation parfaite des règles grammaticales. Ajoutons que cet ouvrage a été composté au Brésil, la photocomposition et la mise en page ont été effectuées aux Pays-Bas et en Belgique, l'impression et la reliure... en Chine! L'un des co-auteurs de l'ouvrage est le Français Gaston WARINGHIEN, professeur honoraire agrégé de grammaire, l'un des plus éminents lexicologues espérantophones mondiaux.*

## RYTHMES D'AFRIQUE POUR LE 40ème CONGRES DE LA FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

*Réunis à la MJC Philippe Desforges à NANCY, siège de leur Fédération, les principaux militants des centres culturels de la Région Est se sont retrouvés dans une atmosphère à la fois studieuse, culturelle et folklorique. Le bilan des activités de l'année s'est révélé particulièrement fructueux. Les cours publics dans différentes villes connaissent un regain de fréqentation, le cours par correspondance est en plein essor et la fréquentation des stages de Week-end ne cesse elle aussi d'augmenter. Entre autres décisions prises lors de ce Congrès, citons l'édition de nouvelles publications informatives destinées au grand public et plus spécifiquement au milieu étudiant, la modernisation du matériel itinérant d'exposition.*

*Le groupe de danseurs africains MATH SAMBA a apporté sa note pittoresque au cours d'une soirée folklorique de qualité qui a enthousiasmé tous les spectateurs.*

## APPRENEZ L'ESPERANTO PENDANT VOS VACANCES!

Pour répondre à des demandes toujours plus nombreuses signalons que la MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE du Château de GRESILLON - 49150 BAUGE organise des stages très fréquentés où, au sein d'activités touristiques et culturelles variées, il est possible de s'initier à l'espéranto par des méthodes actives. Pour l'été 1981, Grésillon propose:

PREMIERE PERIODE: 2 juillet / 22 juillet


- Conférences sur des thèmes variés, discussions, cours, connaissance de la région.

DEUXIEME PERIODE: 23 juillet / 12 août

- COURS pour débutants, cours de pratique de la langue, ateliers divers, connaissance de la région, travaux manuels.
- TROISIEME PERIODE: 13 août / 2 septembre
- Etude et pratique de la langue, activités manuelles et artistiques, connaissance de la région.

## UNE SEMAINE ENCHANTERESSE EN MEDITERRANEE...

*Vous ne pouvez pas aller à Brasilia? Un séjour sur l'île de Malte vous tente peut-être! Pour célébrer le 20ème anniversaire de sa fondation, la Société Espérantiste de l'île vous invite en effet à passer 7 jours au milieu de la Méditerranée, du 1er au 7 septembre. Le programme complet de ce séjour vous sera envoyé par ESPERANTO-SOCIETO "La Espero", New Street off Qormi Road St-VENERA, Malto.*




dernière minute : le célèbre baryton bulgare DAMJANOV chantera au CONGRES NATIONAL de PERPIGNAN


## DEUX NOUVELLES EDITIONS MUSICALES EN ESPERANTO




*Un autre disque de Veselin Damjanov, le baryton bulgare bien connu , vient de sortir des presses; c'est un 33T intitulé "Serenado al Fraŭlino Loli", l'un des plus célèbres poèmes du Hongrois Kalocsay. Une cassette stéréo de 30 minutes enregistrée par la chanteuse SUZANA ... Kasteiviva, éditée en Italie propose de son côté 10 chants "féministes (avec une traduction des "Hommes", du Français Henri TACHAN). L'orchestration -quatre guitares, une guitare-basse et une flûte- accompagne de façon très heureuse les deux voix de SUZANA et MARCELA.*

## SUCCES DU CARNAVAL DE BAR-LE-DUC

Près de 10 000 personnes ont participé (acteurs ou spectateurs) au 2ème carnaval de la ville, le 29 mars 1981. Pour la première fois le club local d'espéranto a participé de façon très suggestive au défilé. Dans des costumes symbolisant diverses nations du monde les espérantophones locaux et de la région, auxquels s'étaient joints quelques Allemands, portaient un "dais" de trois mètres de hauteur sur lequel on pouvait lire: "Si tous les gars et filles du monde" et sur la partie frontale: "nous parlons ESPERANTO".
L'expérience très fructueuse sera renouvelée l'an prochain.




NB - Ces 4 premières pages de LA INFORMILO (édition normale de 12 à 16 pages) rédigées en français peuvent être utilisées pour information à destination de sympathisants éventuels.

Nous rappelons que la cotisation au cours d'espéranto par correspondance est fixée pour cette année scolaire à 87FF (plus éventuellement 30FF pour la cassette d'accompagnement)

Les adhésions sont à envoyer et à régler au responsable:

J.P. COLNOT 15 rue de Lavaux 54520 LAXOU

CCP 1123-38 J NANCY

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC
Le rédacteur: Pol DENIS. Le directe de la publication: Jean-Paul COLNOT.
Dépôt légal n° 245. Inscription à la CPPAP sous le n° 62887.

# 13ème stage de l'espéranto parlé
## 13ª staĝo de parolata esperanto

## Ermitage de Moulins-lès-Metz
**27an kaj 28an de junio 1981**

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernontaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en Esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B. En la kurso D ni ekstudas la literaturon de Esperanto.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki la internacian lingvon.

ESTOS 5 KURSOJ

| | |
|---|---|
| *KURSO A-1* | *por tuj komencantoj* |
| *KURSO A-2* | *por ĵus komencintoj, kiuj atingis pro simume la duonon de la unuagrada kurso* |
| *KURSO B* | *por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili simple povos babili inter si helpe de la libroj menciitaj* |
| *KURSO C* | *la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon.* |
| *KURSO D* | *studo de la verko* "Vojaĝo al Kazohinio" |

**ATENTIGO:** Tiun staĝon organizas niaj samideanoj de METZ. La aliĝilon vi sendu al la sidejo de la klubo kiel indikite... sed la staĝo okazos en **MOULIN-lès-METZ**, kien vi veturos rekte la sabaton posttagmeze.

---

# ALIĜILO

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 25 F por ĉiu persono (plus eventuale 43 F por "*Vojaĝo al K...*" - kurso D), kiel eble kiel frue, kaj antaŭ la 14a de junio al

**CLUB D'ESPERANTO DE METZ**
M.J.C. - 36, rue St-Marcel
57000 METZ

bankoĉeko je la nomo de **CLUB D'ESPERANTO DE METZ**

poŝtĉeko je la nomo de **Madeleine DE ZILAH** CCP 2620 33 W NANCY

(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

*Sr°* ☐ *Sin°* ☐ *Fin°* ☐ *nombro de personoj:*

*NOMO :* *ANTAŬNOMO :* *Nomo kaj Antaŭnomo de la akompanantaj personoj:*

*ADRESO:*

*Tago kaj horo de alveno:* *...de foriro:*

*Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.*

*Mi rezervas manĝojn sabate vespere por personoj, dimanĉe tagmeze por personoj.*

*Mi partoprenos en Kurso A1* ☐ *A2* ☐ *B* ☐ *C* ☐ *D* ☐

BONVOLU TURNI

## PROGRAMO DE LA STAĜO

SABATON, *27an de junio* - Bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenciĝi akurate je la 15a. Jen la laborritmo: *kurso (45 minutoj), ripozo (15 minutoj) ĝis la 18a45. Tiam funkcios la libroservo. Je la 19a30: komuna tagmanĝo.* Je la 20a30 ni ĝuos tre amikan kunestadon kun diapozitivoj, kantoj, ktp...

DIMANĈON, *28an de junio* - matenmanĝo: je la 8a
ni laboros de la 8a½ ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)
poste libroservo kaj ...tagmanĝo je la 12a30
posttagmeze povos okazi diskutoj (proponu temojn), amika kunestado, urbo- aŭ muzeovizito. Por aktivuloj: komitata kunveno kun partopreno de ĉiuj kunlaborantoj.

*Eblas trapasi ekzamenojn, nome:* ATESTO PRI LERNADO
" *praktika lernado*
" *kapableco (skriba parto)*
} *principe dimanĉe matene*

**LA NOMBRO DE LA LITOJ ESTAS LIMIGITA JE 60**
**ALIĜU SUFIĈE FRUE!**

KOSTOJ Aliĝkotizo: *30 F* por ĉiu persono. La Federaciaj Membroj, Abonantoj al la INFORMILO kaj iliaj familianoj, la gejunuloj sub *18* jaroj pagos nur *16 F*.

Manĝo (tagmeza aŭ vespera): *30F.* ranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono):
- *40 aŭ 44F* (laŭ la ĉambro)
- *31 F* por la gejunuloj de 12 ĝis 18 jaroj.
- *26 F* por la gejunuloj ĝis 12 jaroj.

---

# aliĝilo

*Mi antaŭmendas la jenajn verkojn (Kursoj A1, A2, infanoj) (necesa)"Junulkurso"* 24F ☐

... *konsilataj por kurso B "Por la praktikantoj"* 20F ☐
" *por kurso C "Paŝoj al plena posedo"...* 28F ☐

*por kurso D "Vojaĝo al K..."* (necesa) *43F* ☐

*por ĉiuj (laŭdezire tutevidente!).*
*"Lexique Fondamental E°-Français"* 9F ☐
*"Dictionnaire Pratique F-E° kaj E°-F"* 50F ☐
*"Dictionnaire Franç. -Espéranto"* 40F ☐
*"Grand Dictionnaire Espéranto-Français"* 60F ☐
*"Nova Racia Kurso"* 35F ☐
*(kasedo por la N.R.K.)* 30F ☐

(eventuale) mi deziras trapasi trapasi ekzamenon
atesto pri lernado ☐
atesto pri praktika lernado ☐
atesto pri kapableco (skriba) ☐

*La libroj mendi taj estos je via dispono* je via alveno. *Nur la libro* VOJAĜO AL...*estos sendita al la aliĝintoj D por antaŭa trastudo, se antaŭpago atingos nin* sufiĉe frue.

# ni bone kongresis !

*La raporto pri la ESPERANTO-KONGRESO de la ORIENT-FRANCA FEDERACIO, kiu okazis la 14an kaj 15an de marto en NANCY (M.J.C. Philippe DESFORGES) komencu per dankvortoj al ĉiuj organizintoj kaj helpintoj de la NANCY-a grupo, kiuj ebligis glatan funkciadon de tiu 40a federacia kunveno.*

*Tiun kongreson oni nomu tuj laborkongreso, ĉar vidiĝis, ke ĉiuj partoprenintoj ĉeestis la viglajn diskutojn. Malfermis la kongreson nia vic-prezidanto kaj organizinto de la kunveno: S-ro J.P. COLNOT, kiu ankaŭ bonvenigis gastojn el Germanio; Kanado kaj Greklando. Sekvis raporto pri la kursoj en diversaj urboj de la regiono kaj diskuto pri la aktivaĵoj en la lokaj grupoj. Elstaris, inter aliaj, la spertitaj proponoj el BAR-le-DUC, kie esperanto ludas pli kaj pli nemalhaveblan rolon en la ĝemeliĝo inter tiu franca urbo kaj la germana urbo GRIESHEIM (apud DARMSTADT). Sekvinda ekzemplo.*

*La artistoj de la sabata distra vespero venis el alia kontinento: transportis nin en la koron de l'vivanta Afriko la grupo de la sorĉisto MATH SAMBA per ĝiaj kantoj dancoj kaj ritmoj. Multe bedaŭru tiuj, kiuj ne kongresis kun ni!*

*Dimanĉe la kongresanaro aŭskultis la raportojn de la kasisto kaj sekretario. Ambaŭ estis unuanime akceptitaj. Sekvis la elekto de komitatanoj. Reelektiĝis S-ro A dré GROSSMANN kaj Roger DEGRELLE. Nova juna federaciano nun reprezentas la departementon 52 (Haute-Marne): S-ro Pascal DUPUY.*

*Tuj komenciĝis la laboro, ĉar pluraj projektoj estas anoncitaj:*

= diskonigo de la diversaj E°-kursoj (parolaj kaj korespondaj) al la instruistaro fare de la Akademi-Inspektoroj de la ok departementoj.

= aŭtuna reklamo-kampanjo en la studento-loĝejoj de METZ, MULHOUSE, NANCY, REIMS kaj STRASBOURG.

= eldono de flugfolio por la informpetantoj de la koresponda kurso.

= relanĉo de la eksmembroj.

= agnosko de la Federacio fare de la Ministerio pri Edukado kaj la Ministerio pri Junularo kaj Sporto.

= kompletigo de la reto de delegitoj, kies nomo kuŝas en la flavaj paĝoj de la telefonlibro (jam 7 departementoj havas almenaŭ unu delegiton).

= renovigo kaj kompletigo de la ekspozici-materialo, uzebla de ĉiu aktivulo.

= daŭrigo de la subskribo-kolektado (peticio).

*Al UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) la kongreso donacis kvincent frankojn por la Fonduso "Domo 2". La reprezentanto de la Federacio ĉe la UFE-Kongreso en Perpignan ankaŭ transdonos rezolucion al UFE kaj FEI (Franca Esperanto-Instituto) pri modernigo de la diversaj ekzamenoj.*

*Finiĝis la plena kunsido per honorvino, kiun ankaŭ ĉeestos la direktoro de la Junuldomo, Sinjoro DELBACH, la reprezentanto de la socialista partio kaj S-ro HURIET, vic-prezidanto de la Generala Konsilantaro de Meurthe-et-Moselle.*

*Post la komuna tagmanĝo kunvenis la komitato por elekto de la estraro (vidu la ĉi-postan liston), kiu tuj diskutis pri la realigo de la anoncitaj punktoj. Ĉu tio ne estis LABOR-KONGRESO? Ni dankas ankaŭ pro via helpo per aliĝigo de multaj novaj membroj.*

*La sekretario*
*E. LUDWIG*

## REZOLUCIO

La partoprenintoj de la 40a Kongreso de la ORIENT-FRANCA ESPERANTO- FEDERACIO, okazinta en NANCY la 14an kaj 15an de marto 1981

- deziras instigi al modernigo de laainstruado per uzo de metodoj konformaj al la nuntempa lingvopedagogio kaj respektantaj la bazan radikaron eldonitan de la Akademio,
- konsideras, ke kursfina ekzameno povas esti oportuna stimulilo por la
- deziras instigi al modernigo de la instruado de esperanto per uzo de metodoj konformaj al la nuntempa lingvopedagogio kaj respektantaj la bazan radikaron eldonitan de la Akademio,
- konsideras, ke kursfina ekzameno povas esti oportuna stimulilo por la gelernantoj,
- petas, ke UFE instigu FEI al modernigo de la ĝisnunaj ekzamenoj.

## ESTRARO DE LA FEDERACIO

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto: | Pol DENIS | 55 BAR-le-DUC |
| Vic-prezidanto: | Jean-Paul COLNOT | 54 NANCY |
| Sekretario: | Edmond LUDWIG | 68 STOSSWIHR/MUNSTER |
| Helpsekretariino: | Françoise ROUAULT | 68 COLMAR |
| Kasisto: | André GROSSMANN | 68 BALDERSHEIM |
| Redaktoro de "LA INFORMILO": | Pol DENIS | |
| Libro-servo: | Roger DEGRELLE | 54 TOMBLAINE |
| Delegito pri junularaj aferoj: | Bernard VIVIER | 54 JOEUF |
| Ekteraj rilatoj: | Jean-Paul COLNOT | |

### KOMITATANOJ

| | |
|---|---|
| *Brigitte GIUMMELLY* | *57 THIONVILLE* |
| *Madeleine DE ZILAH* | *57 METZ* |
| *Marie-Thérèse GIORGETTI* | *54 NANCY* |
| *Marthe NAU* | *57 THIONVILLE* |
| *Gérard GREINER* | *54 TOUL* |
| *Jean-Luc VANOLA* | *55 BAR-le-DUC* |
| *Pascal DUPUY* | *52 HORTES* |
| *René GUILLAUME* | *54 PONT-SAINT-VINCENT* |

## nia vivo en...

### NANCY

*La kursoj por komencantoj en la Junuldomo daŭre funkcias: 2 lernantoj en la merkreda kurso kaj 3 en la ĵaŭda regule lernas.*

*La 2a-grada kurso interesus dekon da personoj, sed nur 4 efektive aliĝis kaj pagis la kotizon. Jaŭde, 2foje monate ni kune legas "Ĉu li bremsis sufiĉe?"? Merkrede, 1foje monate ni iom lame kaj malregule studas la verkon de W.AULD "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto". Entute 15 kunvenoj okazis,-kiujn meze partoprenis po 4 personoj.*

*En liceo G. de La Tour, mi ĉesigis la kurson pro neregula partopreno de la gelernantoj en la lastaj semajnoj.*

*Mi konsilis al ili daŭrigi sian studadon perkoresponde.*

*J.P. COLNOT*

## BAR-LE-DUC

La gelernantoj de la 1a-grada kurso atingis la finon de LA METODO 11 kaj petis de la KSM adreson de korespondanto. Oni antaŭvidas daŭrigon de kurso pere de "Amuzaj Dialogoj en E°" de S-r° Lienhardt.

Okaze de Karnavalo-Festo, la grupo febre preparis sian aktivan partoprenadon. Amika vespero estis jam okazinta la vendredon 27an de marto en Kultur-Centro de la malnova urbo. Tie 40 personoj kantis, ludis, dancis, teatrumis kaj gustumis la preparitajn frandaĵojn... ĝis noktomezo! Germanoj speciale alvenis (eĉ unu amiko el Hannover!) kaj ankaŭ kelkaj "orientanoj"... Sabaton, la grupo finpretigis la maskojn kaj la kostumojn plejparte ĉe sindonema samideanino Lydia AMBLES, kie gastis kaj dormis pli ol 10 personoj! Dume alia faka skipo slojdis "konstruaĵon" 3 metrojn alta kaj moviĝema (per la muskoloj de la portantoj!). Dum la vespero multaj -nelacigeblaj!- ĉeestis la masko-balon! La dimanĉon 29an, 10 000 personoj svarmis en ĉiuj stratoj de la urbo, ĉu kostumitaj (pli ol mil!), ĉu gapantaj sur la trotuaroj! (la trafikon oni malpermesis dum la tuta posttagmezo en la urbo-centro). La E°-klubo ricevis kiel la aliaj grupoj varman, konstantan aplaŭdon... marŝante dum pli ol 5 kilometrojn. Ĉiu grupano simbolis ian nacion per sia speciala kostumo. La ĉielo estis mirinde favora kaj vespere oni brulis en granda soleno lian Moŝtan Karnavalon sur la plej granda placo de la urbo! Vivu Karnavalon 1981!



## LA KASEROLOFLIKISTO...
(Der Pfannenflicker...)

Leginte en la ĵurnalo artikolon pri la iamaj kolportistoj, mi rememoras kaserolofliksiton venintan en mian vilaĝon...

La kaserolofliksito ne bezonis reklami: lia alveno en la vilaĝon estis diskonigita de la infanoj, kiuj ĝojis lin helpi!

Je ĉiu alveno li havis surprizaĵon por la infanoj, laŭvice ĉiu rajtis funkciigi la balgblovilon por prizorgi la fajron. Iun tagon, elirante el la lernejo, unu el ili demandis lin, kion li manĝos hodiaŭ.

"... Ŝtonsupon! li respondis.
- Ŝtonsupon! miris la infanoj...
- Jes! li respondis, kaj verŝis akvon en grandan marmiton...

Poste li enmetis en ĝin zorge lavitajn rulŝtonetojn. Kompreneble la infanoj estis scivolaj... kaj la ruza flikisto demandis ĉiun -por kompletigi la supon kaj doni al ĝi bongustecon- ke li alportu ion el la patra ĝardeno... "Kaj ankaŭ lardopecon!" li aldiris.

De tempo al tempo la kaserolofliksito kirladis la supon kaj per grandaj gestoj li enmetis terpomon, karoton, brasikon, ktp... kaj la lardopecon!

La supo ekodoris bonege, li enmetis ankoraŭ alportitajn kolbastranĉaĵojn kaj fine... ekmanĝis, manĝadis kun bona apetito; dume la infanoj atente observis.

Restis fine nur la rulŝtonetoj en la marmito... kaj scivolema infano demandis:

"Ĉu vi manĝos ilin?"

La flikisto respondis: "Hm... Ili estas ankoraŭ tro malmolaj... ili estos por morgaŭ!"

La morgaŭan tagon ĉiuj infanoj rendevuiĝis... sed la kaserolofliksito estis for!!

Bük's J.

---

noto de la redaktoro: sub tiu pseŭdonimo kuŝas la nomo de unu el niaj bonaj amikoj, kies bonhumoro kaj fideleco al niaj E°-rendevuoj eksterordinare ekzemplas.

# niaj travivaĵoj

PRI "I.S. - I.F."....

La 24a Internacia Seminario de GEJ kaj la 2a Internacia Festivalo por mezaĝuloj (ĉu vi komprenis la siglojn?) okazis samtempe en la junularrenkontejo Sensenstein apud KASSEL , de la 27a de decembro 1980 ĝis la 3a de januaro 1981.

La kadra temo: "ALTERNATIVAJ VIVSTILOJ" pro sia aktualeco kaj dank' al la kompetenteco de la prelegantoj vekis la intereson de la partoprenantaro, kiu montriĝis tre aktiva okaze de la debatoj.

Feliĉe ekzistis diversaj eblecoj por ripozigi sian menson, partoprenante ĉu sporton, ĉu manlaboran kurson, ĉu banadon, ĉu saŭnadon... Jes ja! Vi bone legis! La ejo, kiu montriĝis tre taŭga kaj komforta, eĉ disponis pri banejo kaj saŭnejo. saŭnejo.


Rimarkindaj estis ankaŭ la diversaj distraĵoj, t.e.:

VESPERA VINPROBO, pri kiu grumblis nur kelkaj hepatoj apartenantaj ĉefe al drinkemuloj!
MUZIKA VESPERO far la fama itala kantisto Gianfranco Molle.
SILVESTRA BALO kun varmega etoso, NOVJARA EKSKURSO tra la arbaro, AŬTOBUSA EKSKURSO al Kassel kun vizito de la urba pentraĵgalerio, kiu entenas multajn Rembrandt/verkojn kaj la...
... ĉiam abomeninda ADIAŬA VESPERO, kiu rompis la ĉarmon, rememorante al la ĉeestantoj ilian baldaŭan disigon kaj foriron!

Bedaŭrinde estas ombro sur ĉi-tiu tenera bildo: proksimume 150 personoj el 16 landoj partoprenis la aranĝon, sed pli ol 100 aliĝantoj devis rezigni pro manko de loko. IS-IF atingis tiel faman reputacion, ke tro multnombraj homoj nepre volas ĉeesti! Pli vastaj ejoj estas malfacile troveblaj kaj ne taŭgus por krei la familian etoson, kiu karakterizas tiujn renkontiĝojn. La organizantoj nun staras antaŭ kruela dilemo: ĉu akcepti ĉi-tiun situacion kaj ĉiujare malakcepti aliĝantojn, ĉu disigi IS kaj IF, riskante tiamaniere fiaskigi aferon, kiu fariĝis preskaŭ institucio...

Tamen ni ne malesperu, kaj fidu la respondeculojn, esperante ke ili trovos la plej taŭgan solvon por la venontaj jaroj. Interesataj personoj sciu, ke ĝeneralaj informoj kaj aliĝiloj aperas dum la INTERNACIAJ KONGRESOJ de TEJO kaj UEA kaj memoru, ke oni neniam aliĝas tro frue!

Bernard VIVIER



ONI ANONCAS EL ĈEĤOSLOVAKIO...

"AMIKOJ DE ESPERANTO" vokas ĉiujn samideanojn, kiuj havas almenaŭ unu antaŭnomon

A N T O N O / A N T O N I N O

cele fondon de internacia asocio de samnomuloj.
Proponojn kaj opiniojn oni sendu je estro de rondeto familia al
S-an° Antonin BOMBIONKA, Sokolovska 1178, 708 00 OSTRAVA -PORUBA IV, ĈSR

ALVOKO DE LA REDAKTORO: Nia INFORMILO estas ĉefe ligilo inter regionaj agemuloj. Ĝi ambicias interalie informi pri okazaĵoj... en tuta orienta Francio. Bedaŭrinde la rubriko "NIA VIVO EN..." ekzemple, aspektas tro ofte "magra". Bonvolu nepre sendi aperendaĵojn diversspecajn al la redaktejo pri viaj lokaj aŭ personaj travivaĵoj.

## AL NIAJ LEGANTOJ, KIUJ NE POVOS PARTOPRENI LA UNIVERSALAN KONGRESON EN BRAZILIA...

... Vi eble tamen ŝatus ĉeesti internacian aranĝon. Jen okazo ĝui internacian etoson, sed samtempe kleriĝi kaj distri sin!

La 5a sesio de SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ okazonta en LIEGE (Belgio) de la 5a ĝis la 12a de julio 1981 prezentos al vi la jenan programon:

= Profesoro MARINOV el Bulgario
*"Sociekonomia bazo de la nuntempa ekologia krizo"*

= Profesoro FRANCK el la Kibernetika Instituto de Paderborn
*"Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva"*

= Doktoro DENOEL el Liège
*"Elementoj de homa fiziologio en rilato kun la edukado"*

= Doktoro LEHRL el Federacia Germanio
*"Enkonduko en la informpsikologio kaj ties pedagogian aplikon"*

aliĝu al S.U.K. !!

La kursoj okazos matene.
PERFEKTIGA ESPERANTO-KURSO estas proponita posttagmeze.

Oficialaj akceptoj, studvizitoj, ekskursoj permesos konatiĝi kun la urbo LIEGE, ĝia regiono kaj ĝia kulturo.

Vespere okazos kultura aŭ distra programo:
*Brazilà, Azia kaj Afrika vesperoj, filmoj pri Bulgario, debato kun belga ekologia asocio, sportaj aranĝoj, pedagogiaj metodoj por handikapuloj, ktp.*

ALIĜO AL UNU KURSO DUM UNU SEMAJNO kostas 1200 belgaj frankoj (900 bf por studentoj)
RESTADKOSTOJ (tranoktado, maten- kaj vespermanĝoj dum unu semajno kostas 2500 bf

*Petu detalan informilon kaj aliĝilon al :*

*S.U.K. BP 9, B-LIEGE X (Belgio)*

## COURS PAR CORRESPONDANCE (perkoresponda kurso)

Depuis septembre nous avons adressé à la presse régionale 69 communiqués au total (envoyés à 11 journaux en moyenne) et nous avons pu contrôler la parution de 47 d'entre eux. Merci aux journaux qui soutiennent notre action et à tous ceux de nos amis qui nous communiquent régulièrement TOUS les articles concernant l'espéranto ou le problème des langues en général. Tous les articles reçus depuis septembre, collés au format 21x29, sont photocopiés, transmis aux instances de la Fédération, de l'UFE, à SAT-Amikaro à Paris, etc. Nous avons déjà rempli 30 pages cette année. Grâce à votre aide nous pourrons peut-être doubler ce chiffre...


Jusqu'à fin mars nous sont parvenues 170 demandes de renseignements et 44 élèves se sont inscrits. 35 d'entre eux, soit près de 80%, ont commandé la cassette d'accompagnement.

Nous avons publié dans nos précédents numéros les noms de 16 élèves de l'an passé ayant terminé le cours. Actuellement 3 élèves supplémentaires ont terminé leur étude ou sont sur le point de le faire:

M. Pascal DUPUY 52600 HORTES (prof. Mlle ROUAULT)
M. Denis KURT 54150 TOMBLAINE (prof. M. GUILLAUME)
Mlle Geneviève GAUTIER 54100 St-MEMMIE (prof. M. VANOLA)

Nous avons été contactés par le service "Action Régionale" de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO pour participer éventuellement à "l'espérantisation" de l'Afrique francophone.

J.P. COLNOT



# angulo de l' pensulo

pri tiu rubriko respondecas
nur la aŭtoroj de la artikoloj.

"Ankaŭ mi, kiel Sinjoro De Zilah, havis la ŝancon interkonatiĝi kun unu el la plej famaj famuloj en la Movado -kaj tio antaŭ pli ol 25 jaroj-. Mi plie havis la ŝancon konatiĝi kun multaj aliaj. Dank' al tio, mi povis, mi, fari komparojn; kaj, kiel ajn malagrabla povos aspekti la komparo, mi ĉiam havas preferon por tiuj, kiuj batalas en la ŝipo aŭ ĉe la fronto, kompare je tiuj, kiuj restas ekstere aŭ malantaŭe inter si, kaj ne plu zorgas pri nia ĉefa djoro: diskonigi, varbi, instrui.

Ĉiuj -aŭ preskaŭ ĉiuj- havas kvalitojn, kaj kapablas, izole renkontitajn, kapti la atenton kaj aspekti ĉu viktimoj, ĉu herooj. Tamen, mi ne kuraĝas iun grupon ataki, laŭ mia propra deontologio, ĉar mi devus samtempe defendi la aliajn.

Esperanto rajtas malhavi senbatalan periodon por ne perdi jarojn voje al sukceso. Estas pli urĝaj aferoj. La ses lastaj jaroj ne estis tiom malbonaj, kiuj ebligis al la movado renkonti homojn de la valoro de S-ro De Zilah!

Pri la subkomprenita temo, kiu estas la neneŭtralemo de UEA, se estas neneŭtraleco ebligi al la duono de eŭropaj esperantistoj ekzisti inter siaj fermitaj landlimoj, mi konsentos aspekti iel neneŭtrala, ĉu ne vi?

La nuna statuto de UEA postulas, ke novaliĝantaj asocioj skribe konfirmu respekti la neŭtralecon de UEA. En la antaŭa statuto tio ne ekzistis, oni nur fidis al iliaj statutoj, kaj troviĝas, ke la plimulto da orienteŭropaj asocioj aliĝis tiam. Oni do sin turnu al tiuj, kiuj regis la asocion en tia periodo, kaj oni lasu la novan generacion fari sian eblon elturniĝi.

Flanken, la pasinteco. Ek al la laboro!"

Jean-Louis TEXIER
U.F.E. Prezidanto

Noto de la redaktoro:

Per tiu letero de J-L. TEXIER finiĝas la debato, kiu malfermiĝis en nia bulteno antaŭ kelke da monatoj pri la enletera aludita temo.

## KELKAJ ATENTINDAJ KOMUNIKOJ

A/ RADIO ROMA ne plu elsendas en E° dimanĉe sed SABATE je la sama horo: 20h/20h20 GMT, per la samaj ondoj, 41,24 m, 41,15 kaj 31,33. Sekve la programo ne plu estas dissendata je la sama tempo kiel tiu de Radio-Vatikano. *Estus bone, se aŭskultantoj skribus dankajn vortojn al Radio-Roma (Esperanto, CP 320 I-00100 Roma Centro Corr., Italio) pro ĝia saĝa decido.*

B/ La Francoj, kiuj partoprenos la aranĝon en JUNKERWALD, bonvolu memori ke ili devos frue forlasi la kastelon, la dimanĉon 10an de majo... se ili intencas voĉdoni antaŭ la fermo de la fak-oficejoj.

# niaj S.I.G.L.O.J.!

Por iuj novaj esperantistoj, estas eble ne facile kompreni nian kotiz-tabelon kaj la diversajn siglojn uzitajn en ĝi. Per la ĉi-malsupra tabelo ni provas klarigi al ili iom skeme kiel situiĝas la diversaj organizoj, kaj kian kotizo-kategorion necesas elekti por membriĝi al ili.

*Internacia organizo al kiu aliĝas la Landaj Asocioj (L.A.)*

*La Landa Asocio por Francio (U.F.E. - Union Française pour l'Espéranto) al kiu aliĝas diversaj Regionaj Federacioj (ekzemple la nia)*

*Nia Orient-Franca Federacio.*

| klarigo de la sigloj | organizo | junulara sekcio ĝis 25-jara | sidejo | eldonaĵo | kotiz-kategorio |
|---|---|---|---|---|---|
| UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO | UEA | | ROTTERDAMO | "ESPERANTO" | 4 individua membro |
| TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO | ↓ | TEJO | ROTTERDAMO | "Kontakto" | 3 nur aliĝanta membro (ne ricevas eldoĵojn de U.E.A.) |
| Unuiĝo Franca por Esperanto | UFE | | PARIZO | "Franca Esperantisto" | 3 aŭ 4 |
| Junulara Esperantista Franca Organizo | ↓ | JEFO | PARIZO | "Koncize" | |
| Esperanto-Federacio de Orienta Francio | Orienta Federacio | | NANCIO | "La Informilo" | 2, 3 aŭ 4 |

A. GROSSMANN

nova!

**"facile lernu paroli esperanto-lingve!"**

36 specialaj legaĵoj, dialogoj, rakontoj, anekdotoj, proverboj kaj humuraj strofoj.

Prezo (afrankite): 29 FF. La rilata magnetofona kaseto C90 (afrankite): 30 FF. Mendu ĉe André GROSSMANN

5, rue des Pyrénées F-68390 BALDERSHEIM


Poŝta konto: **15 13 92 V STRASBOURG** Francio



# distra angelo

## KRUCVORTENIGMO





Gvidanta Ĉeno: "ludoj"

HORIZONTALE

1 unu el la kvar "koloroj"- uzata en atleta ludo. 2 senfina - kun unu sola desegno - prepozicio. 3 kiel la du unuaj - malmulte - fine de nomoj.de plantfamilioj - likvida litero. 4 el la turka popolo - Romia imperiestro (rad). 5 kroma ludkarto - muziknoto - epoko de la universo (rad). 6 nokta birdo - kartludo. 7 ĝi ludas dia/gonale - moviĝi. 8 insulo - skrapu kampon - interjekcio. 9 perioda oscilo - kiel Hektoro. 10 fenicia dio - malgranda lud/peco (senordigita).

VERTIKALE

1 unu el la kvar "koloroj" - li metie rajdas.-2 valora karto - rilata al movo. 3 ĉefa peco - rapide iri - kondutas al nedifinita kvanto. 4 entenanta flavan metalon - medi/teranea havenurbo. 5 pronomo - kolekto - li blovis die. 6 muziknoto - fine de frakcio - nigra trifolio. 7 figuro - ankoraŭ nedifiniganta - afrika haveno. 8 alia nomo de iza/tido - homa osto (rad) - japana dramo (rad). 9 konforme al kunvivanta homaro - ĉi tie ĝi staras sur siaj kreneloj. 10 por ludi aŭ posti - la kvara "koloro" (senordigita). 11 en komparacio - divizoro - gvidanta ideo.

---

*SOLVO DE LA LASTA KRUCVORTENIGMO (N° 33)*

*gvidfolioj aero pundo jelpo op don via le nord ir numido iv zodiako nei abono uzi al guste ritmo odo urbo rib koroda loko*

## SILABENIGMO

*Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj silaboj malkovru la vortojn kies difino troviĝas dekstre. La 1a kaj 4a kolonoj vertikale legataj formas proverbon.*

ak ata ba bi es faŭ ga ge gno ig ja ko ko mo nar neŭ nio no no no or po po raŭ rdo ri ro ro ro sej si to to to tru va vis zo

| | | |
|---|---|---|
| 1 | + - - + - | aperturo |
| 2 | + - - + - - - - | simileco de estaĵo kun ties praavoj |
| 3 | + - - + | tempounuo |
| 4 | + - - + - | larvo de papilioj |
| 5 | + - - + - - | muzikinstrumento |
| 6 | + - - + - - - | artefarita dormo |
| 7 | + - - + - - - | soveta respubliko |
| 8 | + - - + - | io ajn sensebla |
| 9 | + - - + - | taĉmento |
| 10 | + - - + - - | lacertulo |
| 11 | + - - + - - - | inflama lezo de la nervoj |
| 12 | + - - + - | ofica prizorgado de posteno |
| 13 | + - - + - - | deklari akceptinda |
| 14 | + - - + - | fluvo |
| 15 | + - - + - - - - | cirka artisto |

---

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC
Le rédacteur: Pol DENIS. Le directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT.
Dépôt légal n° 245. Inscription à la CPPAP sous le n° 62887.

CLUB d'ESPERANTO de METZ
M.J.C. St-Marcel
36, rue St-Marcel
57000-METZ

SUPPLEMENT A LA INFORMILO n° 34 - 2° tr. 81

# 13° STAGE PRATIQUE D'ESPERANTO PARLE

Une fois de plus nous organisons pour tous les Espérantistes et les Amis de l'Espéranto de notre région un stage où TOUS PEUVENT PARLER.

Nous invitons tous les Espérantistes des régions voisines, de France, d'Allemagne, de Belgique et du Luxembourg à notre stage qui aura lieu à l'ERMITAGE de MOULINS-lès-METZ les Samedi et Dimanche 27 et 28 juin 1981.

5 cours sont prévus :

- Cours A 1 : pour ceux qui n'ont aucune notion d'Espéranto.
- Cours A 2 : pour ceux qui ont étudié la moitié d'un cours élémentaire par correspondance ou qui ont participé au stage précédent.
- Cours B : pour ceux qui ont terminé un cours du 1° degré: ils apprennent à parler simplement mais uniquement en Espéranto et découvrent la littérature espérantiste.
- Cours C : KROKODILADO MALPERMESATA.
- Cours D : PRI ESPERANTO-LITERATURO.

Il y a donc un menu spécial pour chaque catégorie et c'est pour cela que nous osons inviter tout le monde! Hélas le nombre de lits est limité à 60: respectez la date limite d'inscription si vous désirez loger à moindre frais et agréablement.

PROGRAMME : SAMEDI 27 JUIN 1981

13 - 14h30 : Arrivée et accueil des participants.
15h00 : 1° cours (chaque cours dure 45 minutes - repos de 15 minutes)
18h45 : Service de librairie. Discussions amicales par petits groupes.
19h30 : Repas en commun.
21h00 : Soirée culturelle.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

A recopier
ou
A découper

## INSCRIPTION AU 12° STAGE D'ESPERANTO PARLE

27.28 - 6 - 81
à
MOULINS-lès-METZ

NOM .................................. PRENOM...............................

ADRESSE ...........................................................................

JOUR ET HEURE D'ARRIVEE ............... PAR TRAIN OU EN VOITURE ...............

Cours choisi A 1 A 2 B C D Entourer le cours choisi.

Je réserve ..... lit(S) dans une chambre(s) à .... lit(s) pour la nuit du 27/28 juin

Repas : Samedi soir .......... Dimanche midi ..............

Je désire passer l'examen : Atesto pri lernado
Atesto pri praktika lernado
Atesto pri kapableco

Mettre un OUI où il faut

Etes-vous abonné(e) à la INFORMILO ?

DIMANCHE 28 JUIN 1981

8h00 : Petit déjeuner
8h30 : Reprise des cours selon le rythme de la veille.
11h45 : Service de librairie - Libroservo.
Conversations amicales - Amikeċaj babiladoj.
12h30 : Repas en commun - Komuna tagmanĝo.
14h30 : Visite de la ville ou du musée - Urbo aŭ muzeo-vizito.
Komitatanoj kaj komisianoj havos iom da laboro!

EXAMENS : Les élèves des cours B-C-D peuvent passer un examen. L'examen a lieu le dimanche matin.

## FRAIS DE PARTICIPATION

INSCRIPTION : 30 F par personne
16 F pour les abonnés à la INFORMILO, les membres de leur famille et les jeunes de 12 à 18 ans.
Gratuité pour les enfants de moins de 12 ans.

CHAMBRE ET PETIT DEJEUNER : 40 ou 44 F (suivant la chambre)
31 F pour les jeunes de 12 à 18 ans
26 F pour les enfants de moins de 12 ans.

REPAS DE MIDI OU DU SOIR : 30 F.

## SERVICE DE LIBRAIRIE - - LIBROSERVO

Tout Espérantiste devrait acheter au moins un livre par an : ĉiu Esperantisto devus aĉeti almenaŭ unu libron pojare !

Si vous désirez des livres sans payer les frais de port, veuillez passer commande avant le stage. Vos livres vous attendront et vous trouveront avec joie dès votre arrivée. Pour le cours D, l'étude du livre VOJAĜO AL KAZOHINIO est conseillée avant le stage : envoi du livre dès réception de la commande.

Si ce sont des livres qui ne se trouvent pas dans notre catalogue veuillez les commander assez tôt pour qu'ils aient le temps d'arriver.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LIVRES : Je commande les ouvrages suivants :

- Pour les cours A 1 et A 2 : JUNULKURSO indispensable — 24 F
  RACIA KURSO conseillé — 35 F
  KASEDO DE RACIA KURSO conseillée — 30 F
- Pour les B : POR LA PRAKTIKANTOJ conseillé — 20 F
- Pour les C : PAŜOJ AL PLENA POSEDO conseillé — 28 F
- Pour les D : VOJAĜO AL KAZOHINIO necesa - kun sendkostoj — 43 F

Pour les familles et les groupes veuillez indiquer à part les nom, prénom, adresse et éventuellement âge de chaque participant. Veuillez envoyer votre adhésion accompagnée d'un acompte de 25 F par personne (plus éventuellement 43 F pour VOJAĜO AL KAZOHINIO) avant le 14 juin (dernier délai) à : CLUB D'ESPERANTO DE METZ
M.J.C., 36 rue St-Marcel
57000 METZ

Chèques bancaires à l'ordre de : Club d'Espéranto de Metz
Chèques postaux à l'ordre de : Mme madeleine de ZILAH 2620 33 W NANCY

# LISTO DE LA ĈE NI HAVEBLAJ LIBROJ

**livrée en supplément à LA INFORMILO n° 34**

| | |
|---|---|
| *Aktoj de la Akademio (1963-1967)* | 10,00 F |
| *Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo (Lapenna)* | 24,00 |
| *Al abelujo (poemoj) el la estonia* | 10,00 |
| *La amo de Dante Alighieri (Muller-teatraĵo)* | 26,00 |
| *Asteriks la Gaŭlo (Uderzo-Goscinny)* | 25,00 |
| *Aŝma (anonim-poemaro) el la franca* | 9,00 |
| *Aŭtuno en la printempo (Ba Jin) romano* | 22,00 |
| *La aventuroj de L.R.A. Stultulof la Xa (Dornus-satiroj) 2a eldono* | 26,00 |
| *La avino-ursino (por infanoj) el la ĉina* | 5,00 |
| *Baza literatura Krestomatio* | 30,00 |
| *Belarto (UEA-konkursoj) 1a aŭ 1a* | 3,00 |
| *Bela revuo (por infanoj) el la ĉina* | 2,50 |
| *Biblio - el la hebrea kaj helena* | 55,00 |
| *Bodil kaj la bando (rakonto) el la dana* | 22,00 |
| *Brand (Ibsen-poemaro) el la norvega* | 47,00 |
| *Brilo de fantomo (Ekstrom-novelo)* | 10,00 |
| *Ĉinaj popularaj ludiloj (por infanoj)* | 9,00 |
| *Ĉion faru mem ni ĉiuj (por infanoj)* | 2,50 |
| *Ĉiu-ĉiun (Teo Jung - aŭtobiografio)* | 77,00 |
| *Ĉu vi kuiras ĉine? (Valano-romano)* | 27,00 |
| *Ĉu li bremsis sufiĉe (Valano-romano) 2a eldono* | 27,00 |
| *Ĉu li venis trakosme? (Valano-romano)* | |
| *Decimala katalogo (Universitato de Lublin)* | 37,50 |
| *Dekdu piedetoj (Marjorie Boulton - rakontoj) 2a eldono* | 14,00 |
| *De paĝo al paĝo (Tarkony) 2a eldono* | 26,00 |
| *La dia avarulo (Dobrzczynski) el la pola* | 25,00 |
| *Dudekkvin jaroj (belartaj konkursoj)* | 30,00 |
| *El ĉina poezio (antologio) el la ĉina* | 22,00 |
| *Elektitaj paroladoj (Lapenna)* | 50,00 |
| *El la verda biblio (Lejzerowicz-humuraĵoj) 2a eldono* | 19,00 |
| *El la vivo de netaŭgulo - el la germana* | 18,00 |

| | |
|---|---|
| *El streĉita kordo (Kalocsay-poeziaĵoj)* | 7,00 |
| *Enciklopedio de Esperanto (opo)* | |
| *2a eldono* | 98,00 |
| *Enkonduko al literatura kritiko (Silfer)* | 50,00 |
| *Enkonduko al ekumenaj problemoj - el la pola* | 15,00 |
| *Enkonduko en la libro-sciencon de E° (Haupenthal)* | 14,00 |
| *En maskobalo (Baghy-teatraĵo)* | 27,00 |
| *Esperanta legolibro (Miglionini)* | 10,00 |
| *Esperanta meslibreto - el la latina* | 3,00 |
| *Esperanto en perspektivo (opo)* | 100,00 |
| *Esperantologiaj kajeroj (Budapeŝta-Univers.)* | 35,00 |
| *Esperantologiaj studoj (Wüster)* | 52,00 |
| *Esperantologio (La) (Neegaard)* | |
| *2a eldono* | 11,00 |
| *Esperanto aŭ Interlingua? (Bernasconi)* | 55,00 |
| *Enseignement expériment. de l'Espéranto* | |
| *(Cl. Gacond)* | 6,00 |
| *Eternan gloron al... Maŭ Zedong* | 2,00 |
| *Ezopa saĝo (Kalocsay-poeziaĵoj)* | |
| *2a eldono* | 29,00 |

| | |
|---|---|
| *Fianĉo de l' sorto (Rosbach-romano)* | 40,00 |
| *La filoj de la ŝtonkora homo (por infanoj)* | |
| *el la ĉina* | 16,00 |
| *Frithjof Sagao (Tegner) el la sveda* | 48,00 |
| *Fundamento de Esperanto (Zamenhof)* | 25,00 |
| *Fundamenta Krestomatio (Zamenhof)* | 56,00 |
| *Fabloj (Krilov-poemoj)* | 50,00 |

| | |
|---|---|
| *La Gaja forĝisto (Schneid-spritaĵoj)* | 7,00 |
| *Gaja leganto (Schwerin-ŝercaĵoj)* | 7,00 |
| *Geamiketoj en nia korto (por infanoj)* | 2,50 |
| *Gramatika karaktero de la esperantaj* | |
| *radikoj (La) (Kalocsay) 2a eldono* | 10,00 |
| *Granda historia venko (Maŭ Zedong)* | 1,00 |
| *Gudrun (Jensen-romano)* | 25,00 |
| *Gvidlibro por supera ekzameno (Pechan)* | 34,00 |



| | |
|---|---|
| *Ĝardeno (la) de la urbestro* | 28,00 |
| *(Gabrielli-novelaro)* | |
| *Ĝis nun (Lister-poemoj)* | 8,00 |

| | |
|---|---|
| *Harmonio (la) de la kontraŭdiroj (Haris-studo)* | 10,00 |
| *Hieroglifo (Pioro-noveloj)* | 22,00 |
| *Himno de la kreitaro (religiaj poŝtkartoj)* | |
| *po 10* | 7,50 |
| *Hundbazaro (infanpoemoj) el la hungara* | 22,00 |

| | |
|---|---|
| *Ĥimeroj (la) (De Nerval-poemoj) el la franca* | 26,00 |
| *La imitado de Kristo el la latina* | 17,50 |
| *La infana raso (Auld-poemaro)* | 31,00 |
| *3a eldono* | |
| *Internacia lingvo en eklezio kaj mondo* | 28,00 |
| *(Korytkowski)* | |
| *La infero (Dante Alighieri) el la itala* | 67,00 |
| *Izolo (Kalocsay-poemaro)* | 36,00 |
| *2a eldono* | |
| *Je la flanko de la profeto (Chiussi) el la araba* | [illegible]8,00 |
| *Jihetuan-movado ( ĉina historio) el la ĉina* | 5,00 |
| *Judoj sen mono ( Gold) el la angla* | 28,00 |
| *Junuloj en torento (Engholm)* | 20,00 |
| *2a eldono* | |
| *Justuloj (la) (Camus-teatraĵo) el la franca* | 15,00 |

| | |
|---|---|
| *Kanako el Kananam (Linton-romano)* | 23,00 |
| *Kain kaj Abel (Szathmari-novelaro)* | 38,00 |
| *Kara diablino (Boetman-romano)* | 27,00 |
| *Katolika preĝaro* | 7,50 |
| *Kaŭkazaj rakontoj (Lermontov) el la rusa* | 15,00 |
| *Kie boacoj vagadas (Salovaara-rakonto)* | 10,50 |
| *Kiel akvo de l'rivero (Schwartz-romano)* | 54,00 |
| *2a eldono* | |
| *Kiel diri (Lentaigne-esprimoj)* | 15,00 |
| *3a eldono* | |
| *Kiel malvenki esperanton (ŝercaĵoj)* | 7,00 |
| *Kies naztuko (por infanoj) el la ĉina* | 2,50 |
| *Kien la poezio (Clark-teorio kaj poemoj)* | 20,00 |
| *Kit vivas (Lyngbirk-rakonto) el la dana* | 28,00 |
| *La knaboj de Paŭlo-Strato (Molnar-rakonto)* | 32,00 |
| *2a eldono* | |

| | |
|---|---|
| Koko krias jam (Szilaghyi-novelaro) | 30,00 |
| Konstruu novan ponton (por infanoj) el la ĉina | 4,00 |
| Konsultlibro pri esperantlingvaj bibli-tekoj kaj muzeoj | 25,00 |
| Kristana esperantista jarlibro (1978) | 5,00 |
| Kumeŭaŭa (Sekelj-rakonto) | 22,00 |
| Kvaropo (poemkolekto) 2a eldono | 40,00 |
| Korczak Janusz (Slazakowa) el la pola | 22,00 |
| | |
| La libro de amo (malprudaj poemoj) | 47,00 |
| La libro de la amo (Follereau) el la franca) | 26,00 |
| La libro de Romanoj (Benczik) | 34,00 |
| Une Langue Internationale pour le monde et pour l'Eglise el esperanto | 15,00 |
| Lingvaj anguloj (Baronnet-klarigoj) | 6,00 |
| Lingvaj respondoj (Zamenhof) | 14,00 |
| La Longnazulo (Hauff-rakonto) el la germana | 15,00 |
| | |
| Malriĉaj homoj (Moriez-rakonto) el la hungara | 5,00 |
| Metropoliteno (Varankin-romano) | 60,00 |
| 1887 kaj la sekvo (Waringhien-eseo) | 70,00 |
| La mirinda eliksiro (Rosbach-rakonto) | 13,00 |
| Mistero de l'vivo (Bogh-Hogsted-rakonto) el la dana | 15,00 |
| Morso-klubo (por infanoj) el la dana | 7,00 |
| La morto de ĉielarko (Ady-poemaro) el la hungara | 21,00 |
| | |
| Nekonata (la) konato (Boatman-romano) | 18,00 |
| Ni aktoras (Boulton-teatraĵo) | 6,00 |
| Ni, Homoj... (Heide-rakonto) | 13,00 |
| Nia originala prozo (Apolloner) | 11,00 |
| Ni komedietas (Heide-komedietoj) | 6,00 |
| Ni ludas (Ril-berg-Lowitzer-ludoj) | 6,00 |
| Ni ludas teatraĵojn (Tvarozek-teatraĵo) | 6,00 |
| Nokto de timo (Potts-noveloj) | 13,00 |
| La nova butikisto de Nukugaja (potts-noveloj) | 30,00 |



| | |
|---|---|
| Nova vesto de la pupo | 2,50 |
| Nuancoj (Szczurek-Gabrielli) | 26,00 |
| | |
| Patroj kaj filoj (Turgeniev-romano) el la rusa - 3a eldono | 25,00 |
| Patro, la horo alvenis (ekumenaj preĝoj) | 5,00 |
| Por pli efika informado (Lapenna-konsiloj) | 5,30 |
| Planlingvaj problemoj (Gilbert-studoj) | 25,00 |
| Praĵnjaparamita (Sutro-filozofio) | 9,00 |
| Pli ol fantazio (Bogh rakonto) 2a eldono | 9,00 |
| Pri lingvo kaj aliaj artoj (Auld-eseoj) | 39,00 |
| Pri esperanta tradukarto (De Diego-prelegoj) | 23,00 |
| Primico (Tagor-poemoj) | 27,00 |
| Poemoj (Maŭ Zedong) | 6,00 |
| Pri internacia lingvo (Dratwer-ŝercaĵoj) 2a eldono | 63,00 |
| | |
| Rakontoj pri fantom-spitantoj | 5,00 |
| Rakontu, samideano (opo) | 11,00 |
| La reforma movado de 1898 (ĉina historio) el la ĉina | 5,00 |
| La renesanca periodo (Waringhien-tradukoj) el l afranca | 45,00 |
| La reto (Bukar-teatraĵo) | 6,00 |
| Retoriko (Lapenna-studoj) | 75,00 |
| La Revolucio de la Tajping-a ĉiela regno (ĉina historio) el la ĉina | 8,00 |
| Ribelo kontraŭ la ĉielpalaco (por infanoj) | 8,00 |
| Rimleteroj (Auld-Boulton-rondeloj) | 10,00 |
| Roseroj (Dalsen-kantoj) | 11,00 |
| Rozinjo (Torok-rakonto) el la hungara 2A eldono | 13,00 |
| | |
| Sankta Francisko (Riabinin) el l apola | 25,00 |
| Sciencaj komunikaĵoj | 10,00 |
| Schwartz Raymond (Bernard-prelegoj) | 9,00 |
| Socipsikologio kaj grupdinamiko de la E°-movado (Calevaro) | 12,50 |
| Socia (la) romano en esperanto (Vatré-studo) | 8,00 |

| | |
|---|---|
| *Sekretoj de la marestaĵoj* | 11,00 |
| *La senlingvulo (Korolenko-romano) el la rusa* | |
| *3a eldono* | 28,00 |
| *La senpera verbigo de la adjektivoj (De Hoog)* | |
| *2a eldono* | 10,00 |
| *Simplaj floroj (Debsen-kantoj)* | 9,00 |
| *Skizoj pri teorioj de Esperanto (Drezen-studoj)* | 11,00 |
| *La skurila libro (Sproeck-burleskaĵo)* | 17,00 |
| *Somera simfonio (Leenhard-sonetoj)* | 10,00 |
| *Sportistetoj (por infanoj) el la ĉina* | 2,50 |
| *Streĉita kordo (kalocsay-poemoj)* | |
| *2a eldono* | 40,00 |
| *Sub la signo de la verda stelo (opo)* | 10,00 |
| *Suno kaj pluvo (Riisberg-rakonto)* | 15,00 |
| *Teorio de esperanto (Varankin-romano)* | |
| *2a eldono* | 21,00 |
| *Terminaro por infanludoj* | [illegible] |
| *Tolstoj Leo (Lebrun-rakonto)* | 85,00 |
| *Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz)* | |
| *el la pola)* | 48,00 |
| *Trans la fabeloceano (Sczilagyi-sciigoj)* | 20,00 |
| *Trigroŝa romano (Brecht) el la germana* | 76,00 |
| *La trofeoj (Heredia-sonetoj) el la franca* | 26,00 |
| *Urbo (la) de terura nokto (Thomson-poemaro)* | 10,00 |
| *Vagado sub palmoj (Ribillard-rakonto)* | |
| *2a eldono* | 12,00 |
| *Vendreda (la) klubo (opo)* | 14,00 |
| *Verda robo (Rosbach-sciigoj)* | 26,00 |
| *Verdkata testamento 5schwartz-spritaĵoj)* | 20,00 |
| *Vingt-quatre (les) sonnets (Louise Labbé)* | |
| *el la franca* | 27,00 |
| *Vivendo (Gabrielli-poemoj)* | 32,00 |
| *Vivo de Zamenhof (Privat)* | |
| *5a eldono* | 32,00 |
| *Voĉo (la) de l'silento (filozofio) el la pali* | 15,00 |
| *Vojo (la) al Nirvana (Amuruddha) el la pali* | 10,00 |
| *Vojoj (la) de la eklezio (Paŭlo VI-encikliko)* | |
| *el la latina* | 12,00 |



| | |
|---|---|
| *Zamenhof Lidja (Dratwer-sciigoj)* | 25,00 |

Baldaŭ estos denove haveblaj:

*Anni kaj Montmartre*
*La ĝoja podio*
*La stranga butiko*
*... (ĉiuj el R. Schwartz)*

VORTAROJ:

| | |
|---|---|
| *Lexique fondamental E°-Français (Léger)* | 10,00 |
| *Praktika bildvortaro* | 29,00 |
| *Dictionnaire de poche Fr.-E° / E° - Fr.* | 13,00 |
| *Dictionnaire pratique Fr. - E° / E° - Fr.* | 50,00 |
| *Dictionnaire Français-Esperanto (Léger-Albault)* | 40,00 |
| *Gd Dictionnaire E°-Français (Waringhien)* | 60,00 |
| *Plena vortaro de E° kun suplemento* | 50,00 |
| *Plena ilustrita vortaro de E°* | 195,00 |

La libro-servo peras por tiuj revuoj:

| | |
|---|---|
| *"Espero Katolika"* | 60,00 |
| *"Paco"* | 40,00 |
| *"Bulgara Esperantisto"* | 20,00 |

Diskoj:

| | |
|---|---|
| *Tra la mondo* | 55,00 |
| *Junulkurso-kasedo* | 30,00 |

## U Z M O D O   D E   L A   L I B R O S E R V O

1/ Vi mendas viajn librojn

2/ Vi atendas la pakaĵon, kiu entenas vian fakturon

3/ Vi pagas, kiel eble plej rapide, vian ŝuldon al
DEGRELLE Roger
CCP NANCY 2555 38 L

4/ Vi denove mendas... ĉar vi estas kontenta!